# Novjorka Prismo

Numero 140 — Januaro 2005

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia januara kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 21-an de januaro 2005, 6:30-9:00 ptm

LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – 1) Ni elektos inter 3 DVD-oj (donitaj al nia klubo de Arvidas Kazlauskas) por vidi: a) *Kaunas: Urbo de Konfluo*; b) *Litova Kalendaro: Festoj, Moroj, Tradicioj*; kaj c) *Baltmara Sukceno*

2) Ni ludos nian tradician novjaran ludon: *Dudek Demandoj*.

3) Ni vidos mallongan vidbendon, *Tomaso la Instruisto*, farita de Pilar Rau pri la klaso de Esperanto en Novjorko. ★

## Protokolo de nia Zamenhofa Festo, la 17-an de decembro 2004

Ĉi-jare, laŭ jara tradicio, okazis nia Zamenhofa Festo. Multaj ĉeestantoj kunportis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el diversaj kulturoj de la mondo. Ekzemple, Tom DICKSON mem faris babaganuŝon, kiu estas mezorienta melongenosalato.

Tomaso ECCARDT redaktis la decembran numeron de *Novjorka Prismo*. Ĝi ne aspektas ekzakte kiel la *Prismo* de Jim MEDRANO, sed ĝi alvenis ĝustatempe. La protokolo estis akceptata sen ŝanĝoj. Ĉeestis 20 personoj.

Inter la ĉeestantoj estis du amikinoj de Pilar RAU: Jenn GUITART kaj Ingrid DUDEK. Jenn kaj Ingrid helpas Pilar fari vidbendon pri Esperanto kaj pri nia klubo. Ili faras ĉi-tiun vidbendon kiel projekto por sia filmfaradoklaso ĉe Novjorka Universitato. Kiam mi diris al Ingrid, ke ŝia familia nomo signifas la cifero 20 en Esperanto, ŝi tute surpriziĝis.

Alia gasto estis Valentina KOCINA, el Riga, Latvio, kiu restas kun sia amikino Sofiya SOSKINA kaj ŝia familio.

Alia gasto estis Yoon CHOI, amikino de Tomaso MORGAN. Yoon kaj Tomaso kantis kelkajn kantojn en Esperanto por nia plezuro, inter ili: *Ho, Zamenhof*; *Paca Nokto*; *La Fluanta Tajdo*; *Esperanto Estas la Lingvo por Ni*; kaj *La Espero*.

Ĉe 7:37 ptm, Jeff BLAKESLEE laŭtlegis la liston de la kandidataro. Neniu proponis aliajn kandidatojn. Do, la personoj sur la listo elektiĝis.

Stuart GREEN estis Protokolisto de ESNY dum la jaroj 1994-1995 kaj 2000-2004. Dum la venonta jaro, 2005, Stuart GREEN estos Prezidanto, Tomaso ECCARDT estos Vicprezidanto, kaj Jeff BLAKESLEE estos Protokolisto. La aliaj oficistoj restos kiel antaŭe: Rochelle F. GROSSMAN kiel Korespondа Sekretariino, Sofiya SOSKINA kiel Kasistino, Maki SANO kiel Programdirektorino, kaj Jim MEDRANO kiel Redaktoro de *Novjorka Prismo*.




*Societanoj dum la Zamenhofa Festo de ESNY, decembro 2004.*

Rochelle anoncis, ke ŝi ricevis belan karton de LEE Chong-Yeong el Koreio.

Maki mallonge parolis pri la retpaĝo de la Esperanto klubo en Kabul.

Tomaso E. laŭtlegis artikolon *Letter to the Editor* pri Esperanto, skribita en la jaro 1916 de la bofrato de Zamenhof, Jozefo Silbernik, kiu loĝis en Novjorko.



Ŝiĵimin kantis ĉinan kanton. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*

## Julius Balbin

Cécile Low telefonis kaj informis min ke Julius Balbin loĝas nun en fleghejmo por maljunuloj. Cécile menciis, ke eble plaĉus al li ricevi mesaĝojn de esperantistoj. Kontaktu lin ĉe:



Julius Balbin
Kateri Residence
150 Riverside Drive, Room 812
New York, NY 10024

Oni povas telefoni lin ĉe 646-505-3500. Ĝi estas loka novjork-urba numero por la hejmo, ŝajne ne en lia ĉambro. Cécile diris, ke li ricevas bonan flegadon tie. Feliĉan novjaron al vi ĉiuj! ★

– *Pamela LIEBER*

## Peto por intervjuotoj


Nia nova klubano, Pilar Rau, faras vidbend-projekton en sia universitato pri Esperanto en Novjorko. Ŝi petas volontulojn, kiuj parolus pri la rolo de Esperanto en sia vivo. Kontaktu ŝin ĉe *pilarrau@yahoo.com*, ĉe 646-263-8197, aŭ ĉe la januara kunveno. ★

– *Tom ECCARDT*



## Laste vizitis el Sofio


La 28-an de decembro ĝis la 5-a de januaro vizitis Novjorkon Anĝelina Sotirova, el Sofio, Bulgario. Ŝi vizitis Novjorkon survoje al Florida, kie ŝi instruos kurson pri teatraĵaj artoj. Anĝelina restis ĉe Tom Eccardt antaŭ la nova jaro kaj ĉe ni poste. ★



– *Nancee MEDRANO*

## Laste vizitis el Seatlo

La 29-an ĝis la 31-a de decembro ni ricevis viziton de Ghuzal Badamshina, uzbekistanino, kiu nun loĝas kaj laboras en Seattle, WA. Ghuzal jam vizitis nin plurfoje dum la pasintaj 12 jaroj. Ĉi-foje ŝi iris al kelkaj artmuzeoj kaj renkontis siajn amikojn. Estis plezuro vidi ŝin denove. ★



– *Nancee MEDRANO*

## IBM Plaza

La 2-an de januaro pli malpli dek novjorkaj geesperantistoj kunsidis ĉe IBM Plaza. Interalie oni diskutis pri la frua historio de E-o en Novjorko. ★

– *Tom ECCARDT*

## Pagintaj anoj de Esperanto-Societo de Novjorko 2004

| | | | |
|---|---|---|---|
| Hilda Aronson | Eni Fernandes | Martin Levine | Lillian Rachele |
| George Baker | Margot H. Gerson | Pamela Lieber | Douglas M. Rose |
| Lynn C. Bartlett | Irene Ginsberg | E. James Lieberman | Maki Sano |
| Ulrich Becker | Stuart M. Green | Jonathan Liechty | Isolde Schehr |
| Jeff Blakeslee | Rochelle F. Grossman | Cécile Low | Sofiya Soskina |
| Neil Blonstein | Takaki Julian Hashimoto | Eugene Markov | Witold Symonowicz |
| Paul J. Burke | Mitsutaka Inui | Jim Medrano | Humphrey Tonkin |
| Norman B. Calvert | Pierre Jelenc | Nancee Medrano | Arnold Victor |
| E. Semra Çelik | Renata Kaczmarska | Rebecca Medrano | Sheppard Wahnon |
| Richard Connell | Alex Karkovsky | Emily Medrano | Doris Wheeler |
| Brian Drake | Ernest E. Kovary | Carlos E. Ortiz | Maurice J. Wittenberg |
| Thomas Eccardt | Chong-Yeong Lee | Daniel M. Perlman | Tomoko Yamashiro-Petrov |
| Jill Sophia Fein | Thomas Leong | Mary Pulley | **Sumo: 51** |

*Krome, 6 personoj aŭ grupoj abonis* Novjorkan Prismon. ★

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Januaro 2005** — **21**

**ESNY KUNVENO**
1) Balta DVD; 2) Dudek demandoj; 3) Vidbendo de Pilar Rau
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Februaro** — **6**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe* **IBM Plaza**
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 141)

**18**

**ESNY KUNVENO**
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium

## Vizitu Baltion en 2005!

Ĉu vi planas partopreni en la UK en Vilniuso, Litovio? Se jes, vi havas eblecon pasigi nek UNU, sed DU semajnojn inter geesperantistoj el diversaj landoj kaj konatiĝi kun du baltaj najbaraj landoj anstataŭ unu dum la vizito al la balta regiono. Vi povas demandi: 'Kiel mi faru tion?' Tre simple: vi povas partopreni BET-41 (Baltaj Esperanto-Tagoj), kiu okazos en Rigo, Latvio la 15-21-an de Julio, 2005. La UK-90 komenciĝos la 23-an de julio.



Por plia informo vizitu *www.aliaflanko.de/latvio*. Feliĉan vojaĝon al la Esperantujo! ★

**"Verda Ondo"** – *Sofija SOSKINA*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Stuart Green (631) 751-5683
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Jeff Blakeslee (718) 383-2715
**Vicprezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Kasistino** Sofiya Soskina (914) 738-6084
**Program-Direktorino** Maki Sano (212) 614-9184

**Novjorka Prismo**
Numero 140 – Januaro 2005
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com


© 2005 Esperanto Society of New York